

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: NELSON PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTORO: LÁSZLÓ ZINNER

JARABONO

Eksterlande — Cr\$ 30,00

BRAZILIO — Cr\$ 15,00

Aŭ 25 Respondokuponoj

RIO DE JANEIRO, SEPTEMBRO 1947

JARO I

Monata eldono

N.º 6

Redakcio kaj Administrejo
R. das Marrecas, 19, 2.º and.
Tel.: 22-5300 — C. P. 3677
Ekzemplero — Kr\$ 1,00

NIA DEK-UNUA

La ombro de la dua mondmilito jam malaperis de sur la Tero, kaj jen nia movado iĝas, iom post iom, pli harmonia en la tuta mondo!

Kvankam la mondsituacio ankoraŭ ne estas tute normaligita, oni jam povas konstati, ke en ĉiuj landoj renaskiĝas pli forta la idealo pri neŭtrala internacilingvo, la ĝenerala apogo al Esperanto; kaj ni plengoje povas vidi la kunfandiĝon de U.E.A. kaj I.E.L.

Ankaŭ en Brazilo oni tion konstatas, kaj ni ĉiuj bone scias, ke nia dek-unua kongreso sendube prezentos al la brazila esperantistaro bonegan oportunecon interdiskutadi la problemojn pri organizado, propagando kaj instruado, en nia lando, de la kara helpilingvo elpensita de D-ro Zamenhof.

Dek kongresoj jam okazis ĝis nun:

- 1^a. — 1907 — Rio de Janeiro,
- 2^a. — 1909 — São Paulo,
- 3^a. — 1910 — Petrópolis,
- 4^a. — 1911 — Juiz de Fora,
- 5^a. — 1913 — Rio de Janeiro,
- 6^a. — 1921 — Rio de Janeiro,
- 7^a. — 1923 — Rio de Janeiro,
- 8^a. — 1926 — Vitória,
- 9^a. — 1936 — Rio de Janeiro,
- 10^a. — 1945 — Rio de Janeiro,

kaj eble neniu havis tiom gravan signifon, kiom la dek-unua havas pro la ĝeneralaj favoraj cirkonstancoj.


Ni tre bedaŭras, ke jam ne plu estas ĉe ni la patra gvidanto de nia movado — D-ro. Couto Fernandes —, kiu sindonege bataladis por nia idealo; tamen ni ja fidus pri nia sukceso, ĉar ni estas certaj pri tio, ke aliaj sekvas lian belegan ekzemplon, kaj la movado kreskos ĉiam pli kaj pli.

En ĉiuj sektoroj de la homa vivo oni vidas la efektivigon

de la progreso: la industrio perfektigas, la komerco akiras novajn sistemojn pli praktikajn, la pedagogio prezentas pli efikajn metodojn por la instruado de lingvoj, sekvas la scienco vojon plenan de grandaj eltrovoj kaj inventoj; urgas, do, gesamideanoj, ke ni navigu al Esperanto pli perfektan organizsistemon, pli modernajn instrumentojn, kaj pli vastan kaj efikan propagandon. Tiamaniere, ni ĉieligite ekvilibros la internan ideon de tiuj, kiuj sentas la bezonon de unu ilo por la Frateco kaj la Paco, kaj la

idealon de tiuj, kiuj pensas nur pri la uzado de Esperanto en siaj ĉiutagaj travivaĵoj.

Ni, kunigitaj, povos harmonie pristudi kaj pridiskuti, kaj fine decidi pri la komunaj problemoj, de kies solvo dependas la fina venko de Esperanto en Brazilo. Ne povas ekzisti, ni asertas, pli inda maniero honori nian karegan Majstron Zamenhof, ĉar tiel ni montras al la mondo, ke ni sekvas la donitan ekzemplon, tial ke ni nin dediĉas al la afero super ĉio, kaj ke ni flankenlasas egoismon, malhumilecon kaj la privatajn disputojn.



La Organiza Komitato jam ricevis multajn estimoprovojn de la aŭtoritatoj, el kiuj ni povas menci: S-ro Ministro por Militaj Aferoj, S-ro Ministro por Justecaj Aferoj, S-ro Ambasadoro José Carlos de Macedo Soares, S-ro Prezidanto de la Brazila Instituto pri Geografio kaj Statistiko, S-ro Urbestro de São Paulo, S-ro Ŝtatestro de Rio de Janeiro, S-ro Ŝtatestro de Santa Catarina, S-ro Deputito Hugo Borghi, k. a.

PROGRAMO

- La 13an je la 15^a horo — Prepara kunsido: elekto kaj enoficiĝo de la Estraro kaj Specialaj Komitatoj; prezentado de la oficialaj leteroj.
- La 13an je la 17^a horo — Koktelo al la gazetoj kaj radistacioj de São Paulo. Libera nokto.
- La 14an je la 8^a horo — Promenado al Instituto Butantan.
- La 14an je la 15^a horo — Instaligo de poŝtagentejo ĉe la kongresejo.
- La 15an je la 9^a horo — Solena inaŭguro de la ekspozicio.
- La 15an je la 14^a horo — Arta kunveno.
- La 15an je la 21^a horo — Prelego.
- La 19an je la 12^a horo — Ĝenerala kunveno.
- La 16an je la 9^a horo — Vizito al la Urba Biblioteko.
- La 16an je la 17^a horo — Kunveno de la Specialaj Komitatoj.

- La 16an je la 21^a horo — Vizito al la gazetaro.
- La 17an — Libera mateno.
- La 17an je la 12^a horo — Tagmanĝo.
- La 17an je la 15^a horo — Kunveno de la Specialaj Komitatoj.
- La 18an — Ekskurso al urbo Santos.
- La 19an je la 9^a horo — Vizito al la Juĝistara Tribunalo.
- La 19an je la 12^a horo — Ĝenerala kunveno.
- La 19an je la 17^a horo — Vizito al la radistacioj.
- La 19an je la 21^a horo — Prelego.
- La 20an je la 9^a horo — Vizito al la urbaj aŭtoritatoj.
- La 20an je la 15^a horo — Vizito al São Paulo Esperanta Klubo.
- La 21an je la 8^a horo — Ekskurso al urbo Campinas.
- La 21an je la 21^a horo — Solena fermkunsido.

LA FELIĈULO

C. N. BLASIĤOF

La stacion Bologoje de la fervojo Nikolaevskaja forlasas pasaĝera vagonaro. En unu el la duaklasaj vagonoj "por fumantoj", volvitaj per vespera duonlumo, dormetas kvin pasaĝeroj. Ili ĵus manĝetis kaj nun, apogante sin kontraŭ dorsoj de brakoseĝoj klopodas por ekdormi. Silento.

Malfermiĝas la pordo kaj en la vagonon eniras alta, bastonsimila figuro portanta brunaĉan ĉapelon kaj dandan palton kiu tuj memorigas korespondistojn operetajn kaj tiuj el verkoj de Julio Verne.

La figuro haltas meze de la vagono, ronketas kaj longe fermetante la okulojn rigardadas brakoseĝojn.

— Ne, ankaŭ ĉi tiu ne estas la vagono — diras la figuro. Nur la diablo scias kio okazis. Estas simple indignaĵo! Ne, ankaŭ ĉi tiu vagono ne estas ĝi!

Unu el la pasaĝeroj atente alrigardas la figuron kaj eligas gajan krion:

— Ivan Alekseeviĉ! Per kia sorto? Ĉu estas vi?

Bastonsimila Ivan Alekseeviĉ ekstremitas, malsaĝe alrigardas la pasaĝeron kaj lin rekonzante gaje elstarigas la brakojn.

— Ga! Petr Petroviĉ! diras li. Kiom da tempo! Kaj mi eĉ ne sciis, ke vi veturas en sama vagonaro.

— Ĉu vi fartas bone?

— Pli malpli bone tamen, paĉjo, mi maltrafis mian vagonon kaj nun mi neniel ĝin povas trovi, jen kia idioto mi estas! Oni devus min punvipi.

Bastonsimila Ivan Alekseeviĉ sin ŝanceletas kaj ridaĉas.

— Okazas, ja, tiaj aferoj! Daŭrigas li. Post la dua sonorizado mi eliris el la vagono por drinki glaseton da konjako. Nu, tute certe, mi ĝin drinkis. Kaj jen mi ekpensis: ĉar la sekvonta stacio estas tre malproksima, ĉu mi ne drinku alian glaseton da konjako? Dum mi pensas kaj drinkas eksonas jam la tria sonorizado... kaj mi kiel frenezulo ekkuras kaj ensaltas en la plej proksiman vagonon. Ĉu mi ne estas idioto? Ĉu mi ne estas kokinido?

— Nu, vi ŝajnis gajan animstato — diras Petr Petroviĉ. Bonvole sidiĝu.

— Neniel... mi ekserĉos mian vagonon. Adiaŭ!

— En mallumo vi povas eĉ fali de la vagona plataĵo. Pli bone estas, ke vi sidiĝu kaj kiam la vagonaro alvenos al la stacio vi ekserĉu vian vagonon. Sidiĝu!

Ivan Alekseeviĉ ĝemetas kaj nedecideme sidiĝas antaŭ Petr Petroviĉ. Sajne li estas tre ekscitita kaj moviĝas kvazaŭ sidante sur pingloj.

— Kien vi veturas? demandas Petr Petroviĉ.

— Mi? Tra la spaco. En mia kapo estas tia konfuzo, ke mi mem ne scias kien mi veturas. La sorto min veturigas kaj mi, ja, veturas. Ha... ha... Mia kara, ĉu vi iam vidis feliĉan malsaĝulon? Ne! Do, rigardu min! Antaŭ vi estas la plej feliĉa el la mortemuloj! Jes! Ĉu mia vizaĝo ne montras ion?

— Kiel oni dirus... oni vidas, ke vi estas iom... iomete...

— Mi supozas, ke mia mieno montras nun senspritecon! Ho, ve, kia bedaŭro, ke mi ne posedas speguleton por vidi mian vizaĝejon! Mi sentas, mia kara, ke mi iĝas idioto, honora vorto. Ha... ha... Ĉu vi povas imagi, ke mi estas en mia edziĝvojaĝo? Nu, ĉu mi ne estas kokinido?

— Vi? Ĉu vi, ja, edziĝis?

— Hodiaŭ, mia kara. Kaj tuj post la religia ceremonio ni venis en la vagonaron.

Komenciĝas gratuloj kaj kutimaj demandoj.

— Vidu nun... ridas Petr Petroviĉ. Estas certe pro tio, ke vi dande vestiĝis.

— Jes... Por kompletigi la iluzion mi eĉ surspruĉis min per parfumo. Ĝis la oreloj mi eniris vantecon! Mi ne plu havas zorgojn nek pensojn, nur iuspecan... nur diablo scias per kio oni ĝin nomas... ĉu bonstatanimecon? De mia naskiĝo mi ne sentis min tiel bonege!

Ivan Alekseeviĉ fermetas la okulojn kaj tien kaj reen turnadas la kapon.

— Mi estas indignige feliĉa — diras li. Vi, ja, juĝu mem. Jen mi estas irona mian vagonon. Tie, sur la apogseĝo, ĉe la fenestro, sidas estaĵo, kiu laŭdire, estas tute al mi dediĉita. Estas blondulino, kiu posedas nazeton... kaj fingretojn... Ho, mia animo! Mia anĝelo! Kia ĉarmulino ŝi estas! Gvidantino de mia animo! Kaj kiajn piedetojn ŝi posedas, ho, Sinjoro! Tiuj piedetoj, ne kiel niaj piedegoj, estas io miniatura, enorsociĝa... io alegoria! Tuj ekestas deziro manĝi tiujn piedetojn! Ho, ve, vi ja nenion komprenas. Vi estas materialisto; ĉe vi jen analizado kiel kaj kia. Sensenta solulo, jen kiu vi estas kaj neniu alia. Tamen, kiam vi edziĝos, vi rememoros ĉi tion, kaj tiam vi demandas: kie estas Ivano Alekseeviĉ? Jes, mi do iros mian vagonon. Oni senpacience min atendadas tie... antaŭgustumas mian ĉeeston. Min renkonte venas rideto. Mi malpeze eksidiĝas apud ŝi kaj per du fingroj ekprenas ŝian makzeleton, jen kiel...

Ivan Alekseeviĉ rondirigas la kapon kaj eligas feliĉan ridon.

— Poste, mi metas mian kapon sur ŝian ŝultreton kaj ĉirkaŭprenas ŝian talion. Nin ĉirkaŭas silento... poetika duonlumo. Dum tiuj minutoj oni ekdeziras ĉirkaŭbraki la tutan universon. Petr Petroviĉ, permesu al mi, ke mi vin ĉirkaŭprenu!

— Tre volonte!

La du amikoj, akompanataj de ridado de la ceteraj pasaĝeroj, ĉirkaŭbrakas unu la alian kaj la feliĉa ĵusedziĝinto daŭrigas:

— Por pligrandigi la malsaĝecon aŭ, laŭ kion rakontas la romanoj, por pligrandigi la iluzion, oni iras la bufedon kaj unuglute drinkas du aŭ tri glasetojn da konjako. Post tio, en la kapo kaj en la brusto okazas eĉ el la oni ne povas ellegi eĉ el la fabeloj. Jen mi estas: homo malgrava kaj sensignifa, tamen ŝajnas al mi, ke mi estas senlima... Mi tutan universon ĉirkaŭprenas per mia estaĵo!

La pasaĝero, rigardante ebrietan, feliĉan ĵusedziĝinton, infektiĝas de lia gajeco kaj ne plu sentas dormemon. Anstataŭ unu aŭskultanto, ĉe Ivan Alekseeviĉ nun estas kvin. Li sin turnigas kvazaŭ sidante sur pingloj, elspruĉas salivon, svingas la brakojn kaj senĉese babiladas. Kiam li ridegas, ĉiuj ankaŭ ridegas.

— La ĉefa afero, sinjoroj, estas malpli cerbumadi. Al diablo ĉiuj analizadoj... Kiam oni eksentas deziron drinki, oni drinku kaj ne komencu filozofadi ĉu tio estas utila aŭ malutila. Al diablo filozofaĵoj kaj psikologioj!

La vagonon trairas konduktoro.

— Bona homo, alparolas lin la ĵusedziĝinto, kiam ĉi trairos vagonon n-ro 209, trovi en ĝi sinjorinon portanta grizan ĉapelon ornamitan per blanka birdeto kaj diru al ŝi, ke mi estas ĉi tie!

— Mi komprenas. Tamen ĉi tiu vagonaro ne havas vagonon n-ro 209. Ĉi havas n-ro 219!

— Nu, 219! Estas, ja, same! Do, diru al tiu sinjorino, ke ŝia edzo estas sana kaj nedifektita!

Neatendite Ivan Alekseeviĉ sin prenas je la kapo kaj ekĝemas:

— Edzo... Sinjorino... ekde kiam? La edzo... Ha... ha... Oni devas min punvipi, por ke mi ne pensu pri la edzo. Ah, kia idioto mi estas! Kaj ŝi! Antaŭ nelonge, ŝi estis knabineto... insekteto ŝi

estis. Oni simple ne povas kredi je tio!

— Nuntempe estas eĉ iom strange ekvidi feliĉulon — eldiras unu el la pasaĝeroj. Oni pli facile povas ekvidi blankan elefanton ol feliĉulon.

— Jes, kaj kiun oni devas kulpigi? diras Ivan Alekseeviĉ etendante siajn longajn krurojn kun pintaj ŝuoj. Se vi ne estas feliĉa, vi mem estas kulpa. Jes, kion, ja, vi opiniiis? La homo estas kreanto de sia propra feliĉo. Kaj vi, se vi ekvolos, estiĝos feliĉa, tamen vi, ja, ne volas. Vi obstine devojiĝas de la feliĉo!

— Jen kio, vere? Sed kiamaniere?

— Tre simple!... La naturo postulas, ke homo dum certa periodo de sia vivo amu. Kiam venos tiu periodo, amu, do, per ĉiuj fortoj; sed vi, ja, malobeas naturon, vi ĉiam atendadas ion. Plue... La leĝoj diras, ke ĉiu normala individuo nepre devas edziĝi... Ne ekzistas feliĉo ekster geedĝo. Sekve, kiam venas oportuna tempo, oni edziĝu sen prokrastado! Sed vi, ja, ne volas edziĝi; vi ĉiam atendadas ion. Krome, estas dirite en Sanktaj Skribaĵoj, ke vino ĝojigas homan koron. Se oni sin sentas bone kaj deziras ankaŭ pligrandigi tiun stato, oni, do, devas iri bufedon kaj drinki. Estas grave, ke oni ne eksaĝumu sed sekvu la normojn. Normaro estas grava afero.

— Jen vi diras, ke homo estas kreanto de sia propra feliĉo. Al la diablo! Kia kreanto li estas se eĉ malsana dento aŭ kolerema bopatrino sufiĉas por ke lia feliĉo difalu je pecetoj? Ĉio dependas de okazo. Okazu nun al ni katastrofo, vi sendube ekkantus alimaniere...

— Senencaĵo! protestas la ĵusedziĝinto. La katastrofo okazas unufoje en jaro. Mi ne timas kian ajn okazon, ĉar ne ekzistas kialo por ke ĝi okazu. La okazintaĵoj estas maloftaj! Ke ili iru al diablo! Mi eĉ paroli pri ili ne volas. Jen ni, ŝajne, alveturas al malgranda stacio.

— Kien vi veturas nun? demandas Petr Petroviĉ. Moskvon aŭ ien pli suden?

— Kia demando! Kiamaniere mi veturante norden povas alveturi ien suden?

— Sed Moskvo, ja, ne estas norden.

— Tion mi ja scias, tamen ni veturas nun Peterburgon — diras Ivan Alekseeviĉ.

— Ekkompatu nin, ni veturas Moskvon.

— Sed... Kial Moskvon? ekmiregas la ĵusedziĝinto.

— Stranga afero... Vi aĉetis bileton por veturi kien?

— Peterburgon.

— Tiukaze mi vin gratulas. Vi eraris pri vagonaro.

Ekostas duonminuta silen-

to. La ĵusedziĝinto leviĝas kaj per sensprita rigardo ĉirkaŭrigardas la ĉestantojn.

— Jes, jes — klarigas Petr Petroviĉ. En Bologoje vi erare eniris ĉi tiun vagonaron. Al vi, do, okazis, ke drinkinte konjaken, vi ensaltis renkontan vagonaron.

Ivan Alekseeviĉ paliĝas, prenas sin je la kapo kaj rapide ekmarŝas tra la vagono.

— Ho, kia idioto mi estas — koleras li. Ho, kia kanajlo mi estas, ke diabloj min formanĝu! Nu, kion mi faros nun? Mia edzino ja estas en tiu vagonaro! en ĝi ŝi sola min atendadas kaj malesperas! Ho, mi, pajla pajaco!

La ĵusedziĝinto falas sur brakoseĝon kaj tordiĝas kvazaŭ al li iu piedpremis kalon.

— Mi estas mizerulo! Ĝemas li. Kion mi faros? Kion?

— Nu, nu... konsolas lin la pasaĝeroj. Ne gravas... Telegrafu al via edzino kaj penu envagoniĝi en rapida vagonaro. Tiamaniere vi ŝin baldaŭ atingos.

— Rapida vagonaro! plorkrias la ĵusedziĝinto, la "kreinto de sia feliĉo". Kaj kie

TANGER, INTERNACIA URBO SEN INTERNACIA LINGVO!

Tanger, internacia urbo, antaŭ kaj post la lasta milito havas 105.000 enloĝantojn, el kiuj, pli ol 50.000 estas araboj. Oni parolas arabe, hispane, france, oficiale; angle, portugale, duonoficiale; ankaŭ pro la diverseco de la tieaj alinacianoj oni iomete komprenas germane, jude, pole... La "bakaloj" (arabaj komercistoj) eĉ komprenas hungare, svede — almenaŭ por interkompreniĝi kun iliaj klientoj... Nenien do, estas pli urĝa kaj necesa la enkonduko de internacia lingvo ol en tiun modernan Babelon... La konfuzo pro nekompreneo estas konstanta kaj neevitebla... Ĉerte, la enloĝantoj parolas ĝenerale 3-4 lingvojn pli-

malpli bone, ĉar ne estas eble, ke ĉiuj scipovu perfekte almenaŭ unu lingvon. Ofte okazas, ke oni komencas paroli en franca lingvo, kaj sen rimarki oni daŭrigas en la hispana, aŭ alia. Ofte, familioj ĉiam vivantaj en Tanger komprenas 2 lingvojn nekompreneblajn de iliaj najbaroj, kiuj ankaŭ naskiĝis en Tanger.

Ĉe la kruciĝo de Eŭropo kaj Afriko, en la loko, kie renkontiĝas la Oceano kaj la Latina Maro. Grava regiono, kie okazis historiaj moviĝadoj etnikaj, kiuj multe influis la Homaron, sed kies historio malmulte estas konata.

Milsecent jaroj antaŭ nia epoko, jam ekaperis la histo-

1471, kiuj estis la unuaj enkonduki Kristanismon en tiun strangan kaj malsimilan regionon nomatan "Magreb", igante ĝin parto de Eŭropo. Sinsekvaj politikaj intermiksaĵoj, militoj, invadoj, forkuroj, ĝis la portugaloj venkitaj en 1662 transdonis la lokon al Karlo Dua, angla reĝo, kiel doton al lia edzino, Catarina de Bragança, fratinon de tiatempa portugala reĝo.

Denove, kaj sinsekve boliĝis la vivado milita, maltrankvila en tangerana kaldrono, ĝis kiam Tanger, fronte al Gibraltaro, iĝis internacia, pro sia grava geografia kaj politika situacio. Dum 1940, la hispanoj okupis ĝin, ĝis la fino de la lasta milito. Laŭ la statuto internacia, ĉiujn 4 jarojn la estrado de la urbo devas ŝanĝiĝi inter francoj, hispanoj, portugaloj, angloj, kaj aliaj. Sekve la influo lingva, ĉiam dependas de la nacieco de la estro. La nuna estro estas portugala vicadmiralo.

Mi estis en Tangero la unuan fojon en 1932, dum malmulte da tempo. La duan fojon mi reiris ĝin en 1940. Jam la unuan fojon mi renkontiĝis kun UEA-ano tiatempa, Samideano Richard Vincente, franca, malnova esperantisto kaj sperta kemiisto,

mi aranĝas monon por veturi en ĝi? Mia tuta monsumo estas ĉe mia edzino!

Post iom flustradi inter si, la ridantaj pasaĝeroj faras monkollekton kaj provizas la feliĉulon per mono.

Lojaleco de San Martin

Esperantigis ENIO HUGO GARROTO
(Rafaela-Argentino)

Generalo San Martin' estis ĉe la bivako de Mendoza. La adjutanto deĵoranta en la antaŭĉambro de lia budo, eniris iun tagon lian kancelaron, anoncante:

— "Oficiro demandas pri Generalo José de San Martin'."

— "Enirigu lin."

La oficiro eniris kaj klarigas, ke li venas vidi la civitanon, kaj ne la generalon.

— "Ekparolu", San Martin' diris al li.

— Mi venas paroli al vi, kiel filo al sia patro — balbutis la oficiro. Mi estas provizisto en mia korpuso. Hieraaŭ mi ricevis el la milita komisarejo, kiel helpon por la oficiroj kaj soldatoj, monsumon. Kiam mi estis alportanta ĝin al ĝia destino, tiam mi iris malbonsance saluti oficiron, amikon mian, kiu estis malsana. Pluraj kunuloj estis kartludantaj en lia ĉambro kaj ili invitis min akompani ilin. Komence mi rifuzis. Poste mi decidis provi la ŝancon kaj mi riskis la etan sumon, kiu korespondis al mi kiel oficiro, en la tuta kvanto, kiun oni estis liverinta al mi. Ĉar mi ŝuldas al la tajloro, al la lavistino kaj al pluraj provizistoj, ne povante pagi per tiu sumeto mi pensis ke, se mi atingos duobligi aŭ triobligi

ĝin, mi restos kvita. Mi perdis ĝin. Blindigita de la malbonsanco, mi volis rehavi la perdon, mi reludis kaj reperdis... Fine, mi riskis ĉion kion mi havis, kaj mi ĉion perdis... Mi pasigis la nokton vagante ĉirkaŭ la bivako, kiel frenezulo; mi estas senhonoriginta. Mi petas al vi, sinjoro, kompati mian staton kaj savi mian honoron. Mi poste pagos al vi laŭ mia povo, eĉ laborante por vi kiel servisto. Kion mi ne volas, estas, ke oni juĝu min kiel ŝteliston, kaj poste la sciigo atingu mian malfeliĉan patrinon.

Generalo San Martin' respondis post paŭzo:

— Kiel generalo mi estas devigata juĝigi vin antaŭ la milita estraro... Sed vi fidis je mia lojaleco, kaj vi promesas korektiĝi..."

Li malfermis tirkeston de sia skribotablo, kaj eltiris en oraj moneroj de sia propra trezoro la sumon, kiun la oficiro petis al li, kaj li diris, liverante ĝin:

— Iru kaj tuj liveru tiun monon al la kaso de via korpuso... Ke neniam tia afero ripetiĝu... Kaj, antaŭ ĉio, konservu tute sekrete la temon de tiu-ĉi intervjuo, ĉar, se iam Generalo San Martin' sciigas ke vi malkovris ion pri la okazintaĵo, li ordonos tuj mortpafiĝi vin.



rio de Tanger — tiatempe nomita "TINGIS"; Arioj forkurantaj el la nordaj malvarmaj teroj miksitaj kun aŭtoktonaj elementoj, sekve tiroanoj kaj kartaganoj alfluis; tiuj lastaj tiom konataj dum la tiatempa historio okazigis la komencon de konstrua evoluo, militojn, invadojn de ambiciaj kaj invademaĵaj popoloj.

Jen legioj de Roma, kun civiliziga kaj paciga tendenco — kiun la indiĝenoj neniam kapablis atingi — sed post kelkcentjaroj ĝin interrompis la vandaloj, bizantinoj kaj vizigodoj, por ke pli malfrue ĉio ĉi estu forbalaita de l' Islamo.

Sekvis la Historion la invado de la portugaloj en

persona amiko de Zamenhof. Li vigle laboradis por Esperanto, tamen neniu helpis lin — la rezultato ne estis granda — nur la volo kaj klopodo. Kiam la duan fojon mi renkontiĝis kun li, dum la milito, sub la hispana regado, li malgaje sciigis min pri la neebleco de propagandado de nia lingvo. — Ni devis silenti — almenaŭ ŝajnigi la silenton, ĉar la pacbalantoj dum milito estas ĉiam malbonokule vidataj...

Antaŭ kelkaj tagoj mi ricevis la jarlibron de UEA por 1947, kaj malĝoje mi konstatis, ke ne plu estas delegito de UEA en Tanger, kio signifas, ke internacia urbo restas sen internacia lingvo...

(Teksto kaj desegno de LASZLO ZINNER.)

TRA LA MONDO

SVEDUJO — Antaŭ nelonge en Malmo aperis nova, luksa, industria katalogo, kiu reklamas pri pupoj kaj diversaj ludiloj — en Esperanto La direktoro de la fabriko S-ano Lennart Magnusson, kiu estas fervora esperantisto, elokvente pruvis la uzeblecon de Esp-o en industriaĵoj medioj. — (La Folio.)



PORTUGALUJO — Je la 14^a de Septembro, okazos en Lisbono la 1^a Esperanto-Konferenco, ĉe "Azil-lernejo Antônio Feliciano de Castilho." — (Unuiĝo.)



AŬSTRIO — Esperanto-Fidonejo "TREMUNDO" Neütergasse 91, Wien I, proponas honorarion al talentuloj (verkistoj aŭ tradukistoj), kiuj sendos:

a) Ĝis Oktobro 1947: redaktaĵojn pri popolkaraktero; bildojn aŭ kliŝojn pri karakterizaj popoltipoj, urbvidadoj, pejzaĝoj; skizojn pri naciaj artoj, literaturo, rekonstruaj laboroj; bonajn verkojn ĉiutemajn el postmilita nacia literaturo.

b) Sen limtempo: verketojn el literaturo de malgrandaj nacioj, kun la originala teksto.



HISPANUJO — Jen bonega novaĵo el Zaragoza. En la Universitato de "La Laguna" troviĝas kelkaj entuziasmaj samideanoj, kiuj vigle kaj fervore pledis por aranĝo de Esperanto-kurso ĉe la Universitato mem. Kaj fine, la universitata rektoro konsentis pri nedeviga kurso por universitatajnoj; dum la monatoj februaro-majo ĉi-jara. Kiel profesoron de la kurso oni elektis s-ron J. Régulo Pérez, docento de klasikaj lingvoj en la Filologia Fakultato.



HUNGARUJO — Hungara Socialdemokrata Partio deziras uzi Esperanton kun eksterlando. La 35^a Kongreso de la Socialdemokrata Partio en Budapeŝto akceptis Esperanton kiel unu el la lingvoj uzotaj en siaj internaciaj rilatoj. Adreso: Budapeŝto VIII, Rákoczi-u-43.



BULGARUJO — Studenta Sekcio "Progresiva Studentaro" ĉe la Agronomia Fakultato en Sofio, Bulgario, aperigis la unuan numeron ilustritan de "Studenta Fronto", Internacia Studenta Gazeto en Esperanto. La redaktoro petas, ke gesudentoj en ĉiuj landoj skribu al kaj verku por la gazeto.

SUBTENANTOJ

Feliĉe la financa stato de la gazeto pliboniĝas, ĉar la urba samideanaro komprenis la gravecon de tiu periodaĵo, regule alportanta novaĵojn kaj bonan literaturon.

La nombro da subtenantoj de RIO ESPERANTISTA ĉiutage kreskadis. Ĝis nun enskribiĝis la jenaj, kun la respektivaj pomonataj kotizoj: A. E. R. J. Cr\$ 200,00; F. Doblas Filho Cr\$ 50,00; Laszlo Zinner Cr\$ 50,00; D. Pereira de Souza Cr\$ 100,00; Olivio Corrêa Pinto Cr\$ 50,00; O. S. Lopes Cr\$ 50,00; José Cosenza Cr\$ 50,00; F-ino Elza T. Faria Cr\$ 50,00; O. Viana Peixoto Cr\$ 30,00; C. N. Blaschicoff Cr\$ 20,00; V. Guayanas de Sousa Cr\$ 20,00; d-ro Braz Cosenza Cr\$ 20,00; Jayme B. de Araujo Cr\$ 20,00; F-ino Yolanda de Araujo Cr\$ 20,00; A. S. Varão Cr\$ 20,00; Sylla M. Chaves Cr\$ 20,00; F-ino Rosa Lifchitz Cr\$ 20,00; Manoel Barbosa de Mello Cr\$ 20,00; Prof. Roberto das Neves Cr\$ 20,00; Aylton de L. Rocha Cr\$ 10,00; Paulo G. Faro Cr\$ 10,00; d-ro Alcides N. R. Castro Cr\$ 20,00; Jozefo Joels Cr\$ 20,00; F-ino Palmyra M. Vasconcellos Cr\$ 20,00; kap. J. F. Lima Cr\$ 20,00; Florestan Nogueira Cr\$ 20,00; Othon C. Nunes Cr\$ 10,00.

Al ĉiu, ni elkore dankas pro la subteno de nia gazeto, kaj al aliaj samideanoj ni petas, ke ili ankaŭ enskribiĝu por kompletigi la bezonatan kvanton.

LA VERDA ARMEO

VERGILIO MENDES

Oriente, kie la sunradioj kisas la teron, loĝas granda reĝo, la "Amo". Li havas fileton ankoraŭ tre junan, nomatan "Frato".

Iun matenon, la reĝo promenadis kun sia fileto en la ĝardeno de la palaco; ili aŭskultadis la gajan pepadon de la birdoj kaj admiradis la belecon de la floroj, kiam subite el la ĉirkaŭaĵoj aŭdiĝis granda bruado de voĉoj, kaj en la aero leviĝis la unuaj strofoj de iu himno. La infano sciivole streĉiĝis sur la piedpintoj por rigardi trans la barilon de la ĝardeno. Granda popolamaso lavange preterglitis, kaj la himno sonis forte kaj harmonie:

En la mondon venis nova sento,

Tra la mondo iras forta voko ..

Kiuj ili estas, paĉjo? Kion ili volas? Demandis la princo. La reĝo ne tuj respondis, sed li reveme rigardis la kantantojn. Post momento, li diris:

"Tiuĵ homoj, mia knabo, estas viaj plej fidelaj soldatoj." "Ĉu miaj soldatoj?" miris la princo. "Ĉu ne mi amas egale ĉiujn homojn? Ĉu mi povas havi malamikojn? Por kio, do, mi bezonas soldatojn?"

Mia filo, respondis la reĝo, vi estas ankoraŭ tre juna kaj ne konas la malbonaĵojn de la mondo.

Sciu, ke mi, jam de la komenco de la vivo, subtenas teruran militon kontraŭ ne malpli terura malamiko, la "Egoismo", kruela reĝo, kiu sklavigas la homojn al lia potenco.

Kaj la homoj ne ribelas?

Jes, multaj, sed la plimulto el la homoj estas ankoraŭ tre senciaj, kaj li la malnoblulo, tre bone scipovas ekspluati ilian malklerecon. Tiuĵ kom-

patinduloj sklavigitaj de la Egoismo, obstine, fermas la okulojn al la lumo de la Vero, malŝatas la Justecon kaj, ne komprenante miajn leĝojn, nomas miajn soldatojn idiojtoj. Nur post longa suferado, ĉiudirekten travidinte la haladajn marĉojn de la Maljusteco, ĉirkaŭitaj de la densega mallumo de la Nescio, ili eksopiras al Libero; nur tiam, ekaŭskultinte la voĉon de la Vero, ili antaŭsentas ĝian gloron kaj, fariĝinte idealistoj, indigne forpuŝas la superreĝon de mia kontraŭulo kaj aliĝas al miaj armeoj, en kies vicoj ili ĝoje oferas vivon kaj havaĵon. Tiuĵ homoj, kies entuziasman kantadon ni aŭskultas, estas idealistoj, kiuj, kolektiĝinte, starigis armeon — LA VERDA ARMEO — kaj estas tre bravaj. Tro juna vi estas ankoraŭ, sed kun la tempo vi kreskos kaj, dank'al iliaj penado kaj laboro, vi fariĝos grava viro, la plej respektata kaj adorata el mia kortego. Iliaj vicoj dikiĝas pli kaj pli: Kiel flagon ili havas la Esperon; kiel ŝildon la paciencon kaj kiel lancon la Obstinon; kun tiaj armiloj kaj tiaj bravuloj la venko estas certa. Jes, jes, la estonteco nepre estas ilia.

La kantanta amaso ĵus malaperis ĉe la fino de la vojo. Ilia voĉo nun apenaŭ aŭdiĝis.

Estu benata via penado, karuloj! diris la princo. Paĉjo, kiam mi estos plenkreska, la homoj estos pli feliĉaj, ĉu ne?

Kvazaŭ responde, subita ventblovo alportis ĝis ili la lastajn vortojn de la kantantoj:

La popoloj faros en konsento

Unu grandan rondon familian.

(El la portugala gazeto "Natura".)

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto.

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Praça das Nações, 184-B ◊ R. Cardoso de Moraes, 506-A
Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

Comprar bem Camisas, Robes, vestons e Pijamas

SO' NO

O CAMIZEIRO



LASU MIN, HO RIVERETO!

VICENTE DE CARVALHO

(Poeto brazila, 1866a — 1924a j.)

"Lasu min, ho rivereto",
petis timema la flor".
L' akvo, je spito de l' peto,
kantis kaj portis ĝin for.

"Lasu min, filo de l' fonto",
ĝemis la flor', kun amar';
"mi, naskiĝinta sur monto,
timas glutigi de l' mar'."

Vane la flor' petmurmuris;
l'akvo mokridis ja nur
kaj tra l' sablaro flukuris;
tremis la flor' pro terur'.

"Ve, miaj branĉbalanciloj!
Ve, mia kara lulil'!
Ve, rosogutaj helbriloj,
miaj saudadoj vi nil'!"

Gemis la floro, paliĝis,
ploris kun tim-konvulsi';
la rivereto ruliĝis,
ĝin forportante kun si.

"Vin adiaŭs mi, benaj
ombroj, kaj cin, najtingal'";
vin, ho festetoj matenaj;
cin, dolĉa hor' de sunfal'.

Cin, karesema mildvento;
vin, lunolum', kaj stelar'.
Min ne forportu, torento,
cia fluad' al la mar'!"...

En vivofluoj mi tiel
kun la amrestoj de l' kor'
glitas malsupren, ja, kiel
tiuj rivero kaj flor'.

